

Ab Bulgara
ESPERANTISTO

ESPERANTO

v-19479

34

(1965r.)

N. 3-4



1965

3

E N H A V O

	Paĝo
Ĉefartikolo. La Jaro de la Internacia Kunlaborado (At. Lakov) . . .	1
Ivan Ŝivarov. Imopesoj pri Jugoslavio	2
* * * Aleksandro la Granda kaj la flatulo	4
Rosica Georgieva. Impresoj el Svedio	5
* * * Mallongaj dialogoj	5
Aleksandr Gerov. Mi vidis vian filon	6
Ljudmila Jevsejeva. Al patrino	6
Stanka Penĉeva. * * *	7
Danielo Kolker. Gratulo el Sovet-Unio	7
Nikola Aleksiev. Nova jaro — novaj sukcesoj	7
S. Sakelaropoulos. D-ro Anakreon Stamatiadis	9
* * * Aktiva turista agado	10

JUNA ESPERANTISTO

Anna Lukaszewska. Miaj impresoj pri la I-a Internacia Ferio-Seminaro de BEJ en Primorsko	11
Jordan Angelov. Pri kelkaj faktoj	12
Ivan Peev. Por niaj novaj legantoj	13
C. Stojanov. Aktiva Esperanto-grupo	14
Fani Miĥajlova. Aktiva vivo de la studentoj-geesperaniistoj en Plovdiv	14
P. Colov. Renkontoj inter esperantistoj	18
* * * Успех на есперантистите в Пловдив	19

Kovrila paĝo: Vidaĵo el la belega Pirin-montaro en Sudokcidenta Bulgario

Abonkotizo: jara — 1,4 levoj, duonjara — 0,7 lv. Por eksterlando — 2lv., 2 rubloj, 2 dolaroj aŭ egalvaloro; por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Rumanio — 1,6 lv. Aparta numero — 0,14 lv.

Reklamtarifo: 0,15 levoj por cm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv; korespondanconoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.

LANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

ALBANIO: Ing. Cefo Fico, 44 Rruga Stafa, Tirane.

ITALIO: Julia Franceschi, via A. Boito 6, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio. Pjeng' jang P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23 Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, Cal. 13 Septembrie 65, București 5.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, Mitnaja ul. 52/54 kv. 19, Moskva, B-162.

SVEDIO: Karl Kvist, Deje, Box 109—a.

LA JARO DE LA INTERNACIA KUNLABORADO

Antaŭ 20 jaroj fondiĝis la Organizaĵo de la Unuiĝintaj Nacioj — UN. Kiel konate la ĉefa tasko de tiu organizaĵo estas la konservado de la monda paco kaj ĉiuspeca agado kaj aktiveco en monda skalo sur la kampoj de la scienco, kulturo, socia helpo, internacia kunlaborado k. a. Siajn celojn kaj taskojn en la regiono de la internacia kunlaborado UN efektivas per siaj specialaj sekcioj UNESKO, SUNFED (edukado kaj evoluigo), WHO (sano), FAO (nutro kaj agrikulturo) k. t. p.

Okaze de sia jubileo UN proklamis 1965 kiel jaron de Internacia kunlaborado. Kaj tio signifas ke ĉiuj landoj, ĉiuj organizaĵoj kaj ĉiuj homoj kun bona volo devas doni sian kontribuon por la plifirmigo kaj la disvastigo de la noblaj streboj, kiuj estas metitaj en la Statuto de UN kaj plej grave — kunhelpi por ke ili fariĝu efektivaĵo.

Ni, la esperantistoj, estas malgranda, sed avangarda taĉmento por internacia kunlaborado pere de la internacia lingvo Esperanto. Nia tuta agado en nacia kaj internacia skalo estas direktita kaj subigita de plej humanecaj idealoj kio estas reale sentata dum niaj internaciaj kaj naciaj kongresoj kaj aliaj aranĝoj kaj entreprenoj. Al tiu celo servas ankaŭ la plej granda kaj bona parto de la esperanta literaturo — originala kaj traduka.

Universala Esperanto-Asocio alvokis ĉiujn esperantistajn organizaĵojn kaj individuajn esperantistojn en la tuta mondo kunhelpi por plena sukceso de la Jaro de la Internacia Kunlaborado. Tiuokaze ĝi iniciatis kampanjon por kolektado de subskriboj al UN kun propono, „ke la Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la Neŭtrala Lingvo Esperanto“, rekomendante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj „progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj“.

Bulgara Esperantista Asocio varme subtenas la iniciaton de UEA kaj dissendis al la societoj specialajn proponlistojn por kolektado de kolektivaj kaj individuaj subskriboj.

Honora devo de ĉiuj Esperanto-societoj, de ĉiu esperantisto kaj amiko de la internacia lingvo estas fari ĉion eblan por ke la plej forta nacia Esperanto-Asocio en la mondo prezentu sin digne en tiu grava kaj unika laŭ sia karaktero ĝis nun aktiveco. Ili ankaŭ partoprenu en ĉiuj aliaj lokaj aranĝoj kaj iniciatoj okaze de la Jaro de la Internacia Kunlaborado.

IMPRESOJ PRI JUGOSLAVIO

(Fragmento el vojaĝpriskribo)

... Mateniĝis. La pasaĝera ŝipo „Valevo“ forlasas la havenon Rijeka, traŝovas sin inter ŝipegojn, kutrojn, boatojn kaj fine eniras neembarasate la Adriatikon.

Laŭ la kongresa programo, je la 7-a de julio, estas organizita tuttaga ekskurso al insulo Krk. Pli ol 200 gekongresanoj okupas la ferdekon de la ŝipo. La esperanta standardo flirtas supre. Ni kantas, dancas, interŝanĝas impresojn pri la kongresa laboro. La vetero favoras por agrabla vojaĝo per ŝipo. De sur la ferdeko ni ĝuas la belecon de la trankvila maro.

Mevoj!

Neĝoblankaj mevoj!

La konstantaj kunvojaĝantoj de la ŝipoj. . . Ni rapide amikiĝas kun ili. Ni ĵetas al ili pecetojn da pano aŭ biskvitojn. Se oni etendos manon, oni povos kapti ilin.

Ho, ne! Fluganta mevo estas pli ĉarma.

Iu ekkrias!

— Dupin. . . dupin. . . kaj montras al la malproksimo.

— Dupin. . . dupin. . . ripetas alia pasaĝero.

Dupin en serbo-kroata lingvo signifas delfenon.

Kaj mi ekvidis aron da delfenoj, kiuj naĝis sur la akva supraĵo.

En la malproksimo jam estas videbla insulo Krk — nia celo.

Krk estas la plej granda Adriatika insulo — 410 kvadratajn kilometrojn.

En 72 loĝlokoj de la insulo loĝas proksimume 17,000 homoj. Elektran energion la insulo ricevas per submara elektra kablo de la Kontinento.

La celo de nia tuttaga dumkongresa ekskurso estas Punat — la plej granda loĝloko sur la insulo kun 2,000 loĝan-

toj. Ĝi situas en belega valo ĉe la sudokcidenta bordo de la insulo. Milda klimato kreskigas mediteranean flaŭron, en kiu dominas olivarboj, figarboj, vinberujoj kaj aliaj fruktarboj. La belega naturo plezurigas.

Ni proksimiĝas al la haveno. Tie la loĝantaro jam atendas nin. La ŝipo haltas.

Kiel plejaĝulo inter la eksterlandaj esperantistoj-gastoj mi havas la plezuron unua saluti la urbestron. Ni rapide amikiĝis kun la loĝantaro, kies gastigemo kaj afableco estas granda. Ili regalis nin per ŝafidaĵo, fiŝaĵo kaj la bongusta dalmata vino. La belega suna vetero allogis nin al la naturaj plaĝoj.

Per boatoj ni iris en insuleton Košljun, konata persiaj kultur-historiaj monumentoj, el kiuj la plej konata estas la benediktina kapelo el X jarcento; sur la norda flanko de la golfo situas la preĝejo Sankta Dunat el IX jarcento (2 km for de Punat).

Unue ni promenis tra la densa arbaro, kie ni vidis multajn prelokojn-skulptaĵojn kaj poste ni vizitis la preĝejon kaj la muzeon. Ni vidis mirindajn elmontraĵojn inter kiuj ornamitajn amforojn kuŝintajn jarcentojn en la marfundo. Ni vizitis ankaŭ la bibliotekon, kie estas libroj de 13,000 aŭtoroj kun 20,000 volumoj. Tie mi vidis geografiajn atlasojn de 1473 kaj 1511 jaroj.

Posttagmeze, de la 17-a ĝis la 19-a horo, sur la teraso de hotelo „Park“ la junulara loka folkloro grupo de la turista societo en Punat, honore al ni prezentis tre interesajn kaj belegajn dancojn kaj melodiojn de la loĝantoj de insulo Krk.

La tutkora afableco de la loĝantaro, la lazura Adriatika maro, la naturaj plaĝoj ĝuigis niajn korojn.

Adiaŭ Krk! Ni neniam forgesos vin.

* * *

... La 18-a Kongreso de la Jugoslaviaj Esperantistoj finis sukcese sian laboron. La kongresanoj forlasas la belulinon de la Adriatika maro — Rijeka.

La ŝipo per kiu ni veturas al Esperantujo — Primošten — tranĉas la glatan supraĵon de la trankvila maro, kaj lasas post si longan arĝentan vojostrion. . . Niaj konstantaj kunvojaĝantoj — la mevoj sekvas la ŝipon. Nia esperantista grupo el 81 personoj estas sur la ferdeko. La jugoslaviaj esperantistoj pruvis praktike, ke ili ne nur kapablas organizi bonan korean kongreson, sed ankaŭ ili bonege ŝercas, gajas, amuziĝas. . .

Ni faras fotojn, ni kantas, dancas, ridas. . .

Subite nia ĝojo ĉesis. La ĵurnaloj sciigas nin pri la granda terura aŭtomobila katastrofo, kiu kaŭzis la morton de 5 gekongresanoj inter kiuj la bulgara studentino Marija Poslanikova el Plovdiv.

La pasaĝeroj funebras. La ŝipo daŭrigas sian vojon. Ĝi haltas en ĉiu haveno kaj post 12-hora veturado ni alvenis en Primošten. Tie flirtas nia kara verda standardo.

Krepuskiĝas. Ni ne scias kion rigardi unue. Ĉu la ĉarman sunlumigitan bordon, ĉu la pitoreskan golfon, ĉu la kampadejon. La aero estas saturita per pina aromo kaj oni spiras facile-facile. . .

Ni estis loĝigitaj, ni vespermanĝis kaj poste, je la luna lumo, promenis tra la pinarbaro apud la marbordo mem.

Kiam mi vekiĝis post trankvila dormo, la suno estis alte sur la ĉielo.

La esperantista kampadejo Primošten estas renkontejo de esperantistoj diverslandaj.

Antaŭ kelkaj jaroj tiu ĉi malgranda apudmara loko estis tute nekonata kaj antaŭ 3 jaroj, dank' al la iniciato de la esperantistoj, kiuj tie fondis Internacian Kampadejon, ĝi fariĝis bone konata. Pro tio iuj nomas ĝin „Esperantujo“.

La kampadejo situas inter konataj jugoslaviaj havenoj Ŝibenik kaj Split (Ŝibenik distancas 34, Split — 50 kilometrojn). Preter Primošten kondukas asfaltita ĉefvojo, nomata „Adriatika Magistralo“. Al Primošten oni povas alveni per ŝipo aŭ per aŭtomobilo. La urbeto kuŝas sur la duoninsulo ligita per mallarĝa istmo al la kontinento, parte sur la kontinento mem. Mallarĝaj ŝtonpavimitaj stratetoj grimpas al la preĝejo, dominanta la pejzaĝon.

Sur la paralela duoninsulo troviĝas la belega Esperantista Kampadejo (kies konstruo kostas pli ol 400 milionoj da dinaroj) meze de refreŝiga pinarbaro, kiu parfumas la aeron. La loĝantaro estas gastama, la ĉielo — sennuba. Kaj kion diri pri la primoštena ĉarma sunsubiro, pri la fabela nokta beleco? Centoj da esperantistoj el pli ol 20 landoj ĉiusomere vizitas kun siaj gefamilianoj la Internacian Esperantistan Kampadejon ĉe la romantika loko Primošten.

La junaj astronomoj-esperantistoj havas tie sian observatorion kaj ĉiu povas laŭvole rigardi la ĉielajn mirindaĵojn.

Ĉi tie okazis tutjugoslavia pedagogia seminario por Esperanto-pedagogoj. Partoprenis 60 geinstruistoj en du sekcioj: A — por komencantoj kaj B — por progresintoj. Dum la seminario okazis 70 prelegoj, kiujn faris 8 spertaj prelegantoj. Je la fino faris sian ekzamenon 17 komencantoj kaj 22 progresintoj. La seminario finiĝis per festeno.

Pri Primošten oni povas paroli senfine, sed en Jugoslavio estas ankaŭ aliaj rimarkindaj lokoj.

Split!

Haveno Split!

Antikva kaj nova Split!

Regno de la palmoj!

Al kiu direkto ni iru? Kompreneble, la malnova parto de la urbo karese alvokas nin:

— Venu! Venu ĉe min! Mi rakontos al vi ĉarmajn legendojn kaj fabelojn. . .

Kaj nia bulgara kvaropo tuj troviĝis en stranga, mirinda kaj enigmoplena antikva urbo.

Split!

Ni marŝas sen gvidanto. La vendistoj proponas al ni malmultekostajn suveniroyjn.

Ni rigardas kun granda intereso la malnovajn kolonojn. . . murojn, preĝejon, halojn. . . Ni pense foliumas la historion de tiu antikva havenurbo: sinsekvas jarcento post jarcento, gentoj post gentoj, popoloj, militoj, detruoj, brulegoj. La postsignoj restas. . . Ni estas antaŭ ili. Ili parolas pri epoko, kiam la imperiestroj vivis en palacoj, sed la popolo konis nur laboron. . .

Ni forlasas tiun muzean parton kaj post duonhoro ni troviĝis en granda korto de la pentroarta galerio je la nomo de Ivan Meŝtroviĉ.

Sub majestaj cipresoj, palmoj kaj laŭrarboj kuŝas grandaj statuoj de homoj, bestoj, birdoj. . . Impona ŝtuparo kondukas nin supren al granda domo kun grandaj haloj. Ĉi tie estas eksponita la plej granda parto de la figura belarto de Ivan Meŝtroviĉ — genia jugoslavia skulptisto kaj pentristo. Li mem konstruis tiun imponan galerion. Li testamentis tutan sian trezorejon al la homaro.

Ni pasas de halo al halo, ni haltas de pentraĵo al skulptaĵo kaj ni admiras tiun grandan arton, tiun grandan riĉecon.

Laŭ nia plano, ni devas supreniri la monteton, kiu amike alvokas nin:

— Ĉu vi deziras ripozi, ĉu vi deziras revii aŭ ĝui la belecon de la urbo kaj la maro?

— Supreniru la monteton!

Ju pli vi supreniras, des pli vi estas ravita. Vi neniam forgesos la majestatan kaj ĉarman panoramon:

Lazura ĉielo,
trankvila maro,
verda marbordo,
ŝipoj,
boatoj

palmoj, palmoj, palmoj. . .

Neforgesebla panoramo de Split!

Julio 1964

Ivan ŠIVAROV, Plovdiv

ALEKSANDRO LA GRANDA KAJ LA FLATULO

La fama greka arkitekto Dinokrato, sub kies gvido oni planis kaj konstruis en Egiptio la urbon Aleksandrio, emis flati la superulojn.

Foje li vizitis la caron kaj aspergis lin per siaj karesvortoj. Interalie li proponis tiel prikonstrui la monton Atoso, ke ĝi simulu la figuron de Aleksandro, kies du manoj tenas

po unu urbo.

Aŭdinte la flatvortojn, la caro mendis, poste respondis:

— Ĉesu fantazii, sinjoro Dinokrato. Lasu la monton Atoso en trankvilo kaj ne malaltigu ĝin ĝis mia homa staturo.

Tiel Aleksandro la Granda mutigis la flatulon.

IMPRESOJ EL SVEDIO

En septembro p. j. mi vizitis la svedajn geesperantistojn en Stokholmo. Ili akceptis min tre ĝentile kaj amikece. Inter la stokholma esperantistaro estis jugoslavo, nederlandano, ĉeĥino, finlandano, italo, rumano (s-ro Morariu, redaktoro de la sveda gazeto „Espero“), germanino, norvego kaj mi — bulgarino. Ĉiuj loĝis en Stokholmo, kaj dank' al Esperanto ni ĉiuj sentis nin kvazaŭ hejme. La kunveno estis granda kaj komforta kaj la unua tasko de la svedaj geesperantistoj estis trinki kafon kun diversaj dolĉkukoj. Poste ili pridiskutis diversajn temojn. Germanino projekciis lumbildojn pri la terura tertremo okazinta la pasintan someron en Skopje (Jugoslavio). Svedino faris la samon pri la 49-a UEK en Nederlando.

Kelkaj svedaj geesperantistoj, kiuj vizitis nian 48-an UEK en Sofio prezentis bildojn de bulgaraj vidindaĵoj. Okazis ankaŭ speciala bulgara vespero, kiun vizitis pli ol 35 geesperantistoj kaj dum kiu mi prelegis pri la granda progreso de la bulgara esperantista movado dum nia socialisma reĝimo. Oni prezentis ankaŭ filmon

pri la bulgaraj fajrodancistinoj (nestinarki) kaj pri Târnovo k. a. urboj. Ĉiuj estis kontentaj. Interparolinte kun svedaj geesperantistoj mi konstatis, ke nia esperantista movado estas sufiĉe pli vigla ol la ilia, sed ankaŭ ni povas lerni ion de ili. En Svedujo mi havis eblecon renkontiĝi kun svedoj neesperantistoj, kiuj scipovas anglan lingvon, sed kiuj per mia parolado pri la signifado de Esperanto (oni tradukis ĝin sveden) certigis ke en Esperanto oni povas perfektigi multe pli facile ol en kiu ajn alia nacia lingvo. Kaj eĉ kelkaj tuj ekdeziris lerni Esperanton. Inter ili unu estas bonega oratoro en sveda lingvo, sed mi certigis lin, ke li povas fariĝi pli bona oratoro en Esperanto.

Tie mi havis eblecon instrui unu lecionon de Esperanto laŭ Ĉe-metodo, pri kiu oni publikigis informon en la loka ĵurnalo.

Adiaŭante min, la svedaj geesperantistoj kore salutis per mi la bulgaran esperantistaron, kaj esprimis deziron, ke mi denove vizitu ilian landon!

Rosica Georgieva

MALLONGAJ DIALOGOJ

— Dum la tuta tago mi ne povis paroli al mia edzino.

— Kial?

— Por ne interrompi ŝin...

— Ĉu via ŝatata edzino konservis sian sveltan figuron?

— Oh, jes! Ŝi eĉ duobligis ĝin...

La kuracisto, bandagante la kapon de la paciento:

— La vundo estas sufiĉe grava. Kredeble oni atakis vin por mono?

— Jes, doktoro.

— Ĉu vi povus rekoni la atakan-ton, se oni montrus lin al vi?

— Memkompreneble! Sed, doktoro, kiu ne povas rekoni sian edzinon?

— Ĉu mi povas paroli kun s-ro la ĉefredaktoro?

— Li forestas.

— Mi tamen vidis lin antaŭ ioma tempo ĉi tie!

— Jes, tamen li vidis vin pli frue...

— Georgo, demandas la instruisto, kiam mortis la reĝo Henriko IV?

— Sed ĉu li mortis? Mi eĉ ne sciis ke li malsanis — respondis la diligenta Georgo.

MI VIDIS VIAN FILON

„Ho, kara panjo, patrio mia“ . . .
Hristo Botev

Vian filon en amar'
ie pendumilo nigra vi vidis
kun flirtanta harar'
kaj kun heroa forto timiga

Vi vidis kiel sur Vola¹
lian koron kuglo traboris
kaj kiel fiere ĉe l' rok'
en sanga ĉemizo stertoris.

Vi vidis sur la palis'
la kapon de fil' — partizano.
Vi vidis kiel futbala pilk'
ĝin piedfrapis tiranoj.

Sur via kapo aperis
kiel korv' nigra kaptuko
kaj pro malĝoj' kaj ĉagreno
vi ploris malĝoje ho, panjo!

Hodiaŭ floras en bril'
de supre ĉielo senlima,
reehas kant' kun jubil'
tra l' vastaĵoj de nia patrio.

Sen larm' kaj ĉagren'
marŝadas junaj, maljunaj
kaj kantas en la seren'
pri Botev, pri Levski², pri Malĉika³.

Ne ploru, Panjo kara!
Via fil' pli viva estas ol ĉiam!
En niaj koroj li staras
kaj flirtigas alte la flagon.

Via fil' inspirita
sur nia ter' bela irrondas,
kaj tutan popolon li gvidas
al hela kaj ĉarma estonto.

Tradukis:
Maria PRESLAVSKA

A L P A T R I N O

de Ljudmila Jevsejeva

Patrino mia, kara naskintin',
al vi diurne miaj pensoj iras.
Sur vangoj viaj ĉiun sulkon mi
karese tuŝas, amas kaj admiras.

Per ĉiu nokt' sendorma dankas mi,
per ĉiu elverŝita larmoguto.
Mi dankas vin por ĉiu vivotag',
mi dankas vin por ĉiu vivminuto.

Patrino mia, dolĉa oldulin',
kun vi eĉ triste ŝajnas esti hela.

Vi lacas jam, sed ne forlasu min,
ja nur kun vi la vivo estas bela.

Mi pretas vin sur brakoj ĉiam porti,
por gardi vin per mia tuta forto.

¹ Vola — supro en Balkan-montaro, kie en 1876 pereis Hristo Botev — revolucia demokrato kaj genia poeto en malegala batalo kontraŭ la otomanaj subpremantoj.

² Levski — APOSTOLO de la bulgara revolucia liberiga movado, pendigita de la turkoj je la 19-a de februaro 1873 en Sofio.

³ Malĉika — elstara junulara gvidanto, pereinta en la kontraŭfaŝista batalo.

* * *

Pasu mia viv' en tagoj sunaj!
De la viv' nur tion volas mi:
kie mi greneton ĵetis frue
post mi kresku tie ora spik'.

Ja feliĉa estas, kiu en la mond
en fajruj' bruligis incendion...
Diru kia estos la renkont'
kun l' aŭtun', se en la kor' — nenio!

Tradukis: Ruĵa IVANOVA

GRATULO EL SOVET-UNIO

Al ĉiuj bulgarinoj,
al samideaninoj —
al Nadĵoj kaj al Zinoj,
al Manĵoj kaj al Ninoj,

sentante fajrobruon
en mia tro imago,
mi sendas la gratulon
je la Virina Tago!

DANIELO KOLKER

Zaporoĵje — USSR

(korespondanto de „Juna Esperantisto“)

NOVA JARO — NOVAJ SUKCESOJ

Salutparolado de Nikola Aleksiev, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, adresita al la fremdlandaj esperantistoj, ĉe la esperanta disaŭdiĝo de Radio Sofia

La malnova 1964 jaro forpasis. Ni jam eniris 1965-an.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, akiris dum la pasinta jaro novajn sukcesojn. Tie ĉi mi mencias nur kelkajn el ili.

Okazis la 36-a kongreso de Bulgara Esperantista Asocio en ĉeesto de pli ol 1700 delegitoj kaj gastoj. La kongresanojn salutis reprezentantoj de la landaj sociaj organizoj kaj esperantistoj el Sovet-Unio, Pollando, Germana Demokratia Respubliko, Germana Federacia Respubliko, Danlando, Francio, Jugoslavio, Hungario kaj Gvineo.

Krom la konata en pli ol 80 landoj luksa esperanta revuo „Bulgario“, kiu informas pri la ĉiuspecaj atingadoj de nia lando, komencis aperi de januaro 1964 nova granda ilustrita esperanta revuo „Ripozoj“, kiu popularigas en fremdlando la somerrestadajn eblecojn kaj la naturajn kaj kulturajn vidindaĵojn de Bulgario.

En la laboroj de 49-a UK de Esperanto en Hago partoprenis pli ol 80 bulgaraj esperantistoj. Grupo da junaj esperantistoj ĉeestis la 20-an kongreson de TEJO en Amsterdamo.

Por la nova lernoĵaro 1964—65 la Instruministerio preparis kaj dissendis al ĉiuj mezlernejoj Modelan instruprogramon por la gelernantaj esperantistoj. Nur en Vraca — la urbo de la 19-a kongreso de TEJO — pli ol 500 gelernantoj el la politeknikaj kaj specialaj mezlernejoj eklernis la lingvon. En la tuta lando funkcias centoj da kursoj de Esperanto. Jam kvara supera lernejo — la Maŝina-elektroteknika Instituto en la universitata urbo Varna enkondukis Esperanton fakultative.

Estas fonditaj novaj Esperanto-societoj.

La datrevenon de la naskiĝo de la aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof kaj la Tagon de la Esperanta Libro notis la gazetaro kaj la radio. Estis organizitaj festkunvenoj en la urboj Sofio, Jambol, Kârĝali kaj aliloke en la lando.

La pliboniĝintaj rilatoj inter Bulgario kaj Greklando donis eblecon al granda grupo da esperantistoj kaj amikoj de Esperanto el Tesaloniko (pli ol 100 personoj) viziti la urbojn Sofio kaj Plovdiv kiel gastoj de bulgaraj esperantistoj, bonvenigitaj plej kore kaj najbarece.

La pasinta jaro estis jubilea por la bulgara popolo, kompreneble ankaŭ por la bulgaraj esperantistoj. Ĉar oni festis la 20-jaran datrevenon de nia liberiĝo el sub la jugo de la monarkio kaj faŝismo kaj hitlerana okupado. En Nova Bulgario estis malkovrita larĝa vojo ankaŭ por la libera evoluo de la Esperanto-movado. La jaro estis notinda ankaŭ pro la triobla esperanta jubileo: 75 jaroj de post la kreiĝo de la unua esperantista klubo en Sofio, la publikigo de la unua Esperanto-lernolibro por bulgaroj kaj la fondiĝo de la unua bulgara (kaj dua en mondo) esperantista revuo „La Mondlingvisto“. Oni festis solene la 60-an datrevenon de la esperantistaj societoj en la urboj Plov-

div, Kazanlâk, Stara Zagora, Haskovo kaj Pleven. La societoj kaj iliaj ankorau vivantaj fondintoj estis dekoritaj per altgradaj ŝtatordenoj, kio estas aŭtoritata rekono de ilia progresema kultura agado.

Post kelkaj tagoj okazos plenkunsido de la Centra Komitato de Bulgara Esperantista Asocio, kiu pridiskutos la plej aktualajn taskojn de la Asocio dum la nova 1965 jaro. Jam reliefigas granda kaj varia agado en ligo kun la „Jaro de Internacia Kunlaborado“ organizata de UNO kaj UEA. Krom tio antaŭstaras la organizado de Landa Junulara Esperanto-Festivalo, de centoj da novaj kursoj de Esperanto, de larĝampleksa kulturkleriga agado kaj internacia korespondado, helpo al reciproka gastado de esperantistoj, precipe de balkanlandanoj. Reprezentantoj de bulgaraj esperantistoj partoprenos la jubilean 50-an UK de Esperanto en Tokio, la internacian Esperanto-konferencon en Vieno, la Konferencon en Londono de lernejoj en la mondo, kie Esperanto estas instruata, kaj la Tutmondan Packongreson en Helsinki.

Rezulte de la plua pliboniĝo de la rilatoj inter la balkanaj ŝtatoj kreiĝos pli realaj perspektivoj pri komunaj esperantistaj renkontiĝoj kaj konferencoj en balkanlandoj. Nia asocio subtenas maksimume similajn iniciatojn.

Post la 48-a UK de Esperanto, kiu okazis en Sofio kun rekorda nombro da kongresanoj, kun la plej larĝa morala subteno de bulgaraj aŭtoritatoj kaj de ĉiuj tavoloj de nia socio, la bulgaraj esperantistoj ekhavis multajn novajn amikojn en la tuta mondo. Al ili ĉiuj, al iliaj familianoj, al la esperantistaj organizoj en ĉiuj landoj kaj al vi — niaj karaj aŭskultantoj — ni sendas plej korajn novjarajn gratulojn!

Estu sanaj kaj viglaj, senlace laboru per Esperanto por la plifortigo de la paco kaj la amikeco inter la popoloj!

D-RO ANAKREON STAMATIADIS

La 23-an de aŭgusto 1964 mortis en Ateno la eminenta esperantisto D-ro A. Stamatiadis en aĝo 98 jaroj. Li estis kuracisto kiel lia patro kaj studadis en Parizo, de kie li venis al la granda malsanulejo St. Lion en Bayonne, Francio. Lia naskiĝlando estis la insulo Samos, iam memregata ŝtato, nomata princlando, sub la malsevera kontrolo de la tiama Otomana Imperio. Oni vokis lin en Samos kiel ĉefkuraciston-patologon-kirurgon kaj direktoron de la centra malsanulejo de Samos kaj kiel apartan kuraciston de la princreganta familio.

D-ro Stamatiadis esperantistiĝis en 1888, tuj post la apero de „Fundamento de Esperanto“ en la lingvoj franca, angla, germana, kiun D-ro Zamenhof en 1887 eldonis en rusa lingvo. En 1911 li sukcesis eldonigi en Samos la unuan leĝon en la esperantista mondo pri deviga Esperanto-instruado en ĉiuj ses lernejoj de la insulo. La tiama Samosa registaro komisiis lin instrui ĉiujn profesorojn kaj geinstruistojn de la insulo, kion li faris kun bonegaj rezultoj. Li eldonis la gazeton „Greklingva Esperantisto“. Poste li iris al Konstantinopolo, kie li post sukcesa konkurso eniris en la Internacian Sciencan Administracion. Tiu sendis lin al granda lazareto sur la insulo Kamaran, kien ĉiujare venas 60 ĝis 65 mil muzulmanaj pilgrimantoj el la ekstrema oriento, restante tie en dektaga kvaranteno, por ke ili poste rajtu iri al Mekka. Sur la Jemenaraba insulo Kamaran Stamatiadis skribis franclingve la grandan verkon „Camaran“ pri moroj kaj kutimoj de la araboj de Jemen kaj Assir kun franca-araba vortareto kaj frazeologio en dek dialektoj ekstremorientaj.

Post kelkaj jaroj li reiris al Konstantinopolo, kie li fondis la Konstantinoplan Espektanto-Asocion „Bizan-

tio“ kun trilingva eldono de samnoma ilustrita periodaĵo kaj fondis Esperantistan Ligon sub sama titolo.

Kiam la insulo Samos aneksiĝis al Grekio, li translokiĝis en Atenon, ĝia ĉefurbo, kie li oferis sin al intensa aktivado por Esperanto. Li fondis la

Superan Esperanto-Instituton, ankaŭ la Helenan Esperanto-Asocion kaj li eldonis novan Esperanto-gazeton la „Helena Esperantisto“. La Instituto estis rekonita per oficiala Ŝtata Akto kun celo ekzameni kaj provizi per diplomoj la studentojn de Esperanto. En Grekio post mallonge li atingis enkondukon de Esperanto en lernejoj kiel libervola studobjekto.

Post 30-jara servo D-ro Stamatiadis emeritiĝis. Dum 49 jaroj li jam eldonis la gazeton „Helena Esperantisto“, kiu nun nomiĝas „Esperanta ideo“. Dank' al sia penado enkonduki la Esperanto-instruadon en ĉiujn lernejojn de la greka ĉefurbo, li atingis, ke ĉiu nova kulturministro eldonas apartan cirkuleron rekomendante la Esperanto-instruon. D-ro Stamatiadis instruis en daŭro de 38 jaroj ĝis antaŭlasta jaro tute senprofite Esperanton en multaj altlernejoj de Ateno, elspezante multan monon por la transporto al la ekstremaj anguloj de la urbo.

Krom la verko „Camaran“ D-ro Stamatiadis eldonis en novhelenan lingvon du volumojn „Esperanta metodo“ en 6-a eldono kaj „Nova gramatika libro“, „Grek-Esperanta Vortaro“ kun „Esperanto-greka radikaro“. Greklingve li ankaŭ publikigis la dikanon verkon „Del-



finosimi-Genealogi-historio“ kun 180 bildoj personaj, en kiu li priskribis siajn 5000 familiajn antaŭulojn de la jaro 1620 ĝis nun.

D-ro Stamatiadis promesis al D-ro Zamenhof je la V Universala Kongreso en Barcelona ĉiam lukti, labori kaj propagandi por Esperanto. Li oficiale

repzentis sian patrolandon Samos, pro kio D-ro Zamenhof gratulis al li. Li ankaŭ partoprenis en la kongreso de Bern, kie li oficiale repzentis Greklandon. En la antaŭlasta Unversala Kongreso li estis proklamita plejaĝulo de la Tutmondaj Esperantistoj.

S. Sakellaropoulos

AKTIVA TURISTA AGADO

En 1964 la Turista Sekcio „Esperanto“ pliaktivigis sian agadon. En ĝi membras 103 geesperantistoj — membroj de la Esperanto-societoj en Sofio. Oni aranĝis ekskursojn al Rumanio, Velingrad, Pleven, Orjaho, Vidin kaj aliaj loĝlokoj. 13 membroj jam „konkeris“ la montopinton „Ĉerni Vrah“ de Vitoŝa-monto.

Al pluraj eksterlandaj geesperantistoj ni donis la postulitajn informojn pri la ebleco viziti Bulgarijon. Ni starigis kontakton kun la Turista Asocio „La Naturamiko“ — Esperanto-fako.

Malgraŭ la renkontitaj obstakloj la Sekcia estraro, subtenata de la esperantistoj en Sofio, daŭrigis la klopodojn por provizi je mebloj la montodomon „Esperanto“. La domo jam estas ekipita per litoj, matracoj kaj aliaj akcesoraĵoj. Bulgara Esperantista Asocio disponigis 163 m da tolo por pretigo de kurtenoj, kusenoj kaj littukoj. G. Genĉev el Sofio donacis kuirejan fornon kaj D. Haĝiev, bulgara diplomata repzentanto en Tanzanio — ege bezonatan petrolan lampon kun pumpilo. Volontuloj kolektis sufiĉe da brulligno por malvarmaj tagnoktoj.

Lastatempe finance helpis la montodomon: M. Kolĉagova el Velingrad — 25 lv.; V. Bulla, Vestfalen, GFR —

25 lv.; F. Mihalik, Hösel, GFR — 20 lv.; L. Mladenov — 5 lv.; N. Nikolov — 5 lv.; I. Nikolov — 2 lv. kaj N. Kirilov — 2 lv. — ĉiuj el Sofio.

Koran dankon al la donacintoj pro ilia ĝustatempa helpo!

Oni proklamis novajn kunfondintojn de la montodomo: M. Kolĉagova, V. Bulla kaj G. Genĉev. Iliajn nomojn oni enskribis en la listo fiksita en la montodomo.

La montodoma biblioteko havas pli ol 100 volumojn, la plimulton el kiuj donacis diverslandaj geesperantistoj.

Nun la montodomon prizorgas deĵorantoj. Plej ofte deĵoras samideanoj G. Mitov kaj I. Nikolov. Estas serĉata konstanta dommastro. La Komunuma Departemento „Arbaraj Parkoj“ fiksas dekon da vojmontriloj sur la aleoj al la montodomo. Tio pligrandigis la intereson al ĝi.

En 1965 la Turista Sekcio „Esperanto“ plivastigos sian agadon. Ni klopodos finpretigi la montodoman manĝejon, por ke la montodomo — esperantista torĉo en la monto — ek-lumu per sia plena forto.

Estraro de Turista
Sekcio „Esperanto“
P. K. 66, Sofio

PEDAGOGIA TENDARO

La Pedagogia Grupo de la Hungara Esperanto-Asocio intencas organizi dum aŭgusto Duan Internacian Pedagogian Esperanto-Tendaron kun celo pligrandigi la lingvajn, metodikajn, literaturajn kaj movadhistoriajn konojn de la partoprenantoj.

Informojn pri maniero de aliĝo kaj pago, pri loĝkondiĉoj k. a. oni povas ricevi de Pedagogia Grupo de HEA, Szeged, Aprilis 4, u. 1, Hungario.

SEN KOMENTOJ...

MIAJ IMPRESOJ PRI LA I-A INTERNACIA FERIO-SEMINARIO DE BEJ EN PRIMORSKO

Post multaj neeviteblaj en tiaj kazoj formalajoj, ligitaj kun arango de pasporto, mi povis fiere deklari al miaj geamikoj, ke ĉi-jare mi somerumados ĉe la fama Nigra Maro en Bulgario.

Ho, kiom da envio, admiro, multaj supozoj pri atendantaj nin efektaj distraĵoj. Mia imago pentris belegajn iluziojn: en kadro de ekzotika pejzaĝo — dek tagoj da plena ripozado sub la varma suno bulgara, inter novaj amikoj kaj... Esperantista Internacia Seminario de la Bulgara Esperanto-Junularo. Novaj travivaĵoj kaj amuzoj por la nova adeptino de la Internacia Lingvo.

Kaj jen — ni estas sur la bordo de Nigra Maro: la grupo de la polaj geesperantistoj. Kia pitoreska maten-krepusko de la suno milde bonveniganta nin. Belega ĉirkaŭaĵo kaj sincera amikeco ravas la feriumanton jam en la unuaj tagoj. Tagoj, plenaj je varma suno kaj nepriskribebla plezuro, kristala marakvo, naĝado kaj ludoj junularaj. La okuloj senlime ĝuas la ekzotikan pejzaĝon, orajn sablojn; trankvilaj ondoj de la maro karesis ĉiutage la sunbruniĝantajn korpojn. En la komuna moderna manĝejo sonadis diverslingvaj interparoloj kiel „Babel-Turo“...

Unu el la multaj ĉarmaj vesperoj pasigitaj ĉe la alloga dancmuziko kaj arta programo alportis agrablan konatiĝon kun du bulgaraj gestudentoj-esperantistoj kaj aliaj tre simpatiaj gajaj junuloj-membroj de BEJ. Ili la unuaj anoncis al ni pri la komenciĝo de la Unua Internacia Seminario de BEJ. Baldaŭ ĉiuj partoprenantoj eksentis sin

tre proksimaj amikoj kaj unuigitaj per la devizo: „Esperanto ne konas limojn!“

Por efektivigi grandan kaj belan celon oni ne bezonas ofte grandiozajn agojn. Sufiĉis nur kelkaj komune travivitaj tagoj por disrompi ĉiujn diferencojn inter ni kaj plu vivi kiel veraj gefratoj. Mankis nacioj, ekzistis junulara esperantistaro, kies ekzemplo akiris sufiĉan aŭtoritaton inter la ceteraj junuloj-neesperantistoj. Nia patrolando estis la tuta terglobo, kaj ĉefa zorgo: disvastigi nian belsonan lingvon por plenumo de la kanzono, kantata de la seminarianoj:

„Tra tuta kaj vasta terglobo,
en urboj de ĉiu naci’
troviĝas la samideanoj...“

Multaj estas la vojoj al internacia interkompreniĝo. Pri ili prelegis famaj bulgaraj fakuloj. „Ni elektu la plej belan, plej proksiman al ni — la studentaro. Informadi niajn kulturajn atingiĝojn por ke Hristo Botev, Ivan Vazov, Nikola Vapcarov aŭ Elin Pelin estu ŝatataj verkistoj al ĉiu polo, por ke la evoluon de la pola literaturo ekkonu ĉiu bulgaro“ k. s. Pri tio interalie prelegis k-do A. Grigorov, prezentante la riĉan spiritan historion de Bulgario. Tre interesa estis ankaŭ la prelego de doc. Ĉoĉov. Viglaj diskutoj post ĉiu prelego.

Rapide forpasis la neforgeseblaj tagoj, eĉ tro rapide. Pliriĉigitaj je novaj valoroj, ni devis adiaŭi niajn geamikojn. Karaj sinceraj vizaĝoj malaperas en la fenestro de aŭtoĉaro, sed

sonas ankoraŭ iliaj vortoj: „Revenu venontjare!“

Dankon al vi, karaj geamikoj el Bulgario, por la ĉarmaj tagoj kaj belega aranĝo! Ni revenos pli aĝaj je unu jaro de laboro surkampe de Es-

peranto kaj ĝuos refoje la mirindan belecon de la Nigra Maro.

Ĝis la Dua Internacia Seminario kaj Ferio-Semajno dum julio, 1965!

Anna Lukaszewska,

Pollando

(Korespondantino de „Juna Esperantisto“)

PRI KELKAJ FAKTOJ

Mi volas skribi kelkajn vortojn pri la Esperanto-kursoj.

De post kiam mi estas esperantisto kaj legas regule Esperantan gazeton (enlandan kaj eksterlandan) min ĉiam impresas la sciigoj pri malfermitaj multnombraj kursoj. Por mi estas ĝojinde legi sciigojn rilate la sukcese finitajn kursojn kaj ekscii ankaŭ ilian nombron. Bedaŭrinde, similaj sciigoj ĉiam estas iom neĝustigitaj kaj tre koncizaj, ĝeneralaj. Havante eblon multfoje persone konatiĝi kun la faktoj, mi ofte demandas min, pro kio niaj kursoj en la komenco multnombraj en la fino malgrandiĝas? Multaj kursoj eĉ post kelkaj lecionoj disfalas. Kiuj estas la kaŭzoj? Por mi vere estas kelkaj eblaj respondoj: 1) Povas esti, ke nia lingvo estas malfacila, kio malveras. 2) Eble la kursanoj ne multon scias pri Esperanto kaj ĝia utiligo. Tamen ili mem propravole venis lerni ĝin, kio signifas ke ili estas gajnitaj por Esperanto. Per diversaj metodoj ni ofte faras sufiĉan propagandon kaj altiras multajn dezirantojn. Ni eĉ reklamas, ke Esperanto estas tiel facila kaj sufiĉas nur du-tri monatoj por ke oni parolu ĝin, se ne perfekte, almenaŭ kontentige, sed la realeco ofte estas tute alia.

Tiam? ...

Resuminte multajn sciigojn, mi esprimos mian opinion, mi klopodos klarigi la aferon koncize.

En la nuntempa lernejo oni ĉiam parolas kaj diskutas pri enkonduko kaj aplikado de novaj metodoj por instruado de diversaj lernobjektoj. Tiu ĉi fakto koncernas ankaŭ la lingvojn kaj kompreneble — Esperanton. Tamen en la nuna etapo de la instruado de la lingvo Esperanto ne pli ol la duono de la instruantoj kapablas gvidi je alta nivelo (eĉ kontentiga) kursojn. Ofte ne nur la kapableco gravas, sed estas iuj aldonaj faktoroj (se tiel mi povas nomi ilin).

Antaŭ nelonge dum ekskurso mi parolis kun studentino, kiu ŝatas Esperanton kaj varbas ĉiam novajn adeptojn.

— Kiel iras via kurso? — mi demandis.

— Malbone — respondis ŝi. — Ne multaj vizitas ĝin jam.

— Kial?!!!

— Ĉiuj diras, ke la kurso estas teda. La kursgvidanto nur voĉlegas, tradukas kaj skribas nekonatajn vortojn. Nenion li diras pri la Esperantomovado kaj pri la junularo speciale — ŝi zorgoplene finis siajn klarigojn.

Jen estas unu el la ĉefaj kaŭzoj, kiuj fiaskigas la aferon. Se ni nur instruas la lingvon eĉ bonege kaj se la instruado ne havas iajn celojn, ni vere faras nenion. Kiel ni povas konvinki la kursanojn, ke Esperanto estas fenestro al la mondo, ke Esperanto amikigas la homojn? Estas necese, ke

la kursgvidanto prizorgu adresojn laŭeble kaj helpu al la kursanoj krei senperan kontakton. Oni povas kune aŭskulti radion esperantlingve aŭ magnetofonon. Multe efikas rakontadi ŝercojn, anekdotojn, spritaĵojn. Laŭ mi, oni devas paroligi kiel eble plej multe da kursanoj kaj tiel kuraĝigi ilin en la uzado de Esperanto — jen kio estas ege grava.

Lastatempe min timigis alia fakto. En multaj urboj oni permesis la nedevigan instruadon de Esperanto en la lernejoj. Eĉ ni utiligante la okazon, klopodis malfermi pli kaj pli da kursoj. En iuj okazoj la lektoroj estas pagataj. Ĝuste pro la pagado multaj novaj lektoroj elkreskis — ĉu el la arkivo,

ĉu tute novbakitaj. **Neniu kontrolas ilin** — la instruado funkcias laŭ iliaj plaĉoj kaj povoj. Kaj finfine — plej multaj lernantoj forlasas la kursojn kaj ili rilatas ne laŭdinde al Esperanto. **Tiel ni malfortigas la movadon, anstataŭ plifortigi ĝin.**

Iufoje estas kursoj, kiuj komenciĝas kun malpli da gekursanoj kaj finiĝas kun pliigo. Certe tiuokaze io efikas favore al la kurso kaj ĉefan rolon ludis la kursgvidanto...

Konklude mi deziras aldoni jenon: ni ne rigardu la aferon nur laŭnombro, sed ankaŭ laŭkvalite.

Jordan Angelov, instruisto,
Plovdiv

POR NIAJ NOVAJ LEGANTOJ

Karaj gejunuloj kaj junpioniroj, Mi foreste observas vin: vi jam tenas en viaj manoj nian belegan revuon. Kun nekaŝita ĝojo vi foliumas ĝiajn paĝojn. Vi flue tralegas ĝian titolon „Bulgara Esperantisto“ kaj komprenas ĝin korekte. Ĝis tie ĉio iras bone. Kaj jen komenciĝas la penoj. Ja, por unua fojo vi renkontiĝas kun esperanta legaĵo, escepte la lernolibron. Mi kvazaŭ aŭdis vian silabadon. Jes, ĝuste tiel — vian silabadon, sed ne ĉe la tralego de la teksto: la plimulto inter vi estas lernintaj fremdajn lingvojn kaj por tiaj homoj la legado estas facila — ili flue legas, korekte akcentas Esperanton. Vi tamen mense silabas. Estas io, kio memorigas niajn lernhorojn en la elementa lernejo. Tiam ni malfacile povis tralegi la frazon: „Pan-jo hav-as jun-ul-in-on“. Penoj veraj. Tantalaj penoj estis tiam (tiam — ĉar temas pri la blankharula generacio, kiel mi), kiam la vergo estis la nedisigebla instruilo de la tiamaj instruistoj. La frazon ni legadis kvazaŭ ŝtoniĝinte, sed ni bone

komprenis: kiu havas kaj kion havas la patrino. Kaj nun inverse ni devas venigi plurajn gramatikajn regulojn por klare kompreni tiel senpene sencon de la legata frazo. Iom post iom, la vortoj klariĝos. Per **-in, -mal, -o, -a** kaj **-i**, helpe de **-ig, -iĝ**, rememoriginte pri **-ist, -an**, ne forgesinte la **-ej -on**, sed observante la akuzativon vi tralegos la ĉefan artikolon de nia revuo. Eble vi ne ĉion bone komprenos en ĝi samkiel tiujn miajn liniojn, tamen ne malesperu! Substreku la malfacilajn esprimojn, petu helpon de pli spertaj, sed klopodu traduki la tutan ĉefan artikolon. Insistu antaŭ viaj instruantoj ke ili klarigu al vi ĉion de la „Lingvaj demandoj“, „Por nia perfektigo“. Ne preterlasu la rubrikon „Organiza vivo“, spegulanta la enlandan vivon esperantistan.

Antaŭen, karaj gejunuloj kaj anoj de la junpioniraj esperantistaj studrondoj! Al vi, nia morgaŭa anstataŭantaro vigla, ni deziras sukcesojn.

Ivan Peev, Ĉirpan

AKTIVA ESPERANTO-GRUPO

Jam du jarojn en la Ŝtata Industria Entreprenejo „Pobeda“ en urbo Kolarovgrad funkcias Esperanto-grupo. Ĝiaj membroj estas precipe junaj esperantistoj. La grupo ne estas multnombra, sed ĝi havas aktivan organizan vivon. La komsomolanoj aranĝis en la entrepreno E-angulon por popularigado de la Internacia Lingvo. Ili ofte organizas radiodisaŭdigojn pere de la loka Radio. Ĉiuj estas membroj de la urba E-societo „Vekiĝo“ kaj abonantoj de la revuoj „Bulgara Esperantisto“, „Paco“, „El Popola Ĉinio“ kaj aliaj. La junaj esperantistoj korespondas kun amikoj el la tuta mondo. Per la leteroj ili konigas siajn korespondantojn pri la atingajoj de nia socialisma lando, pri la karakterizaj trajtoj de nia popolo, la naturaj belaĵoj kaj vidindaĵoj de nia lando, la paca kaj interesa vivo de la bulgara junularo. Ankaŭ per Esperanto ili ekscias multon pri la vivo kaj la kulturo de la aliaj popoloj, ili gajnas novajn amikojn de nia patrolando.

Niaj kamaradoj estas ne nur bonaj esperantistoj, sed ankaŭ bonaj laboristoj kaj publikaj funkciuloj. K-ino Elena Panova kelkfoje ricevis la honoran titolon „Modela Oficisto“ kaj ŝi estas portantino de la „Pasporto de la labora gloro“. Diana Todorova kaj Bogdan Saltirov estas gvidantoj de profesiaj gru-

poj. Ruska Toneva estas membro de la Estraro de Komsomolo jam 3 jarojn, Kemaljadin Indrizov estas bona seruristo kaj lernanto de la IV-a klaso en la Vespera Teknikumo de Mekaniko.



La interesa kaj aktiva agado de nia E-grupo allogas novajn adeptojn de la internacia lingvo. Oni malfermis duan kurson por komencantoj. La kurso funkcias unufoje dum la semajno. Kun granda intereso ĝiaj partoprenantoj vizitas ĝin post sia laboro. La kursgvidanto estas k-do Cvjatko Todorov, multjara aktiva esperantisto kaj estraro de la urba societo.

Jen kiel niaj laboristoj kombinas la laboron kun la studado. Ili praktike montras sian sindonemon al la internaciismo kaj sian deziron vivi kaj labori en paco kaj amikeco kun ĉiuj popoloj.

C. Stojanov, Kolarovgrad

AKTIVA VIVO DE LA STUDENTOJ-GEESPERANTISTOJ EN PLOVDIV

Je la 14-a de novembro okazis grava organiza kunveno de SES „Studenta Impeto“ en Plovdiv. La kunveno partoprenis multaj membroj de la societo kaj gastoj-reprezentantoj de la Junulara grupo ĉe societo „Kulturo“. La estraro raportis pri la ĝisnuna agado de la societo kaj analizis la atingajojn kaj la mankojn en la laboro. Oni notis, ke dum la lastaj monatoj la societa vivo plivigliĝis. La kunveno,

post utilaj diskutoj, akceptis planon pri la plua agado de la Studenta Societo pri plibonigo de la E-laboro.

Ĝis nun en kunlaborado kun la junaj geesperantistoj-membroj de societo „Kulturo“, la studentoj okazigis diversajn iniciatojn. Regule ili vizitadas kune kinejojn, koncertojn, ĉiam kune ili ekskursas. Dum la lastaj monatoj estis efektivigita bona kontakto kun la junaj sofiaj geesperantistoj, kio estas



Ekskurso de studentoj el Plovdiv
al Vitoŝa-monto

rimarkinda sukceso. Plej bona renkontejo por la junaj geesperantistoj estas nia esperantista klubejo. Ĉiuvespere oni povas renkontiĝi ĉi tie kaj interparoli kun studentoj-esperantistoj kaj junaj membroj de societo „Kulturo“, inter kiuj estas kreita intima amikeco.

Jam ĉiusabate en la klubejo kolektiĝas la membroj de la societo „Studenta Impeto“. Dum la kunveno estis

akceptita plano por la prelegoj. Dum ĉiu sabata renkontiĝo prelegas membroj de la societo en Esperanto pri diversaj temoj. Ĝis nun parolis studento, partopreninto en la Internacia E-Laborbrigado en Jugoslavio. Dum alia renkontiĝo studentino parolis pri STELO kaj pri la II-a STELO-SEMAJNO, okazinta p.-somere en Funka, Pollando.

Nun la studentoj preparas sin por festi solene la datrevenon de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof. Ĉi-okaze ili preparas specialajn murgazetojn, kiujn ili metas en ĉiun superan lernejon en Plovdiv. Por la kunveno ili preparas riĉan programon.

Kune kun la junaj geesperantistoj de societo „Kulturo“ la studentoj intencas festi la Novjaron.

Nia granda deziro estas — per niaj fortoj kaj junulara kapableco helpi al la prospero de Esperanto.

Fani Miĥajlova,
Plovdiv

Bjala Slatina. En monato novembro 1964 estis malfermita kurso de Esperanto por komencantoj. Ĝin partoprenas 15 regulaj entuziasmaj gejunuloj. La kurso okazas en bone aranĝita ĉambro en la Infana Muzika Lernejo. La Urba Kulturdomo disponigis ĝin al la kursanoj.

Pastro Al. Djankov

Kubrat. La 19-an de januaro 1965 oni malfermis kurson en kiu partoprenas ĉiuj gelernantoj el la X-b klaso. Kursgvidanto — Canko Murgin, instruisto en la sama lernejo. La kurson frekventas ankaŭ la instruisto de franca lingvo Zdravko Georgiev.

Nun oni preparas kurson por komencantoj en kiun enskribiĝis 10 geinstruistoj.

Loveĉ. La 28-an de novembro en la salono de la lernejo ĉe uzino № 14 en nia urbo okazis plelego de Bejko Markov je temo: „Esperanto — fenestro al la tuta mondo“. Partoprenis la prelegon 200 gelernantoj, la instruistoj, la direktoro Dimitr Stojĉev, la vicedirektoro Stefan Vankov, la kassistino Margarita Janeva kaj la kontisto Ilija Jalev, ĉiuj esperantistoj. Bejko Markov emfazis, ke la Internacia Lingvo estas facila, ke eĉ laboristoj ne sciantaj fremdan lingvon povas lerni ĝin kaj ĝi estas utila al ili por la batalo por paco. Post la prelego oni malfermis novajn kursojn en la lernejo, kiujn gvidas Vasil Markov kaj Kina Uzunova.

Kina Uzunova
Loveĉ



Renkontiĝo de studentoj el Sofio kaj Plovdiv

V. Ŝipka, en la distrikto de Stara Zagora. Dum la pasinta 1964 jaro la agado de la Esperanto-societo estis entute renovigita. Oni malfermis E-kurson por komencantoj, kiu daŭras ankaŭ nun. La kurson vizitas dudek gekursanoj.

Cv. Dimitrov

V. Pančarevo, en la distrikto de Kjustendil. La E-societo „Razmetanica“ malfermis ekde januaro ĉi-jare du E-kursojn: unu por komencantoj, kiun vizitadas 3 junpioniroj kaj alia por progresintoj. La societo kaj ĝiaj membroj abonis la revuojn „Bulgara Esperantisto“, „Bulgario“, „Paco“ kaj „Heroldo de Esperanto“.

N. Nikolov

Nova Zagora. Jam du jarojn E-societo „Edmond Privat“ ĝuas belegan klubejon. La plej bela konstruaĵo en la centro de nia urbo okulfrapas per sia arta surskribo „KLUB ESPERANTO“. Kune kun la filatelista kaj profesiunuiga organizoj ni laŭ niaj povoj laboras por la Internacia Lingvo Esperanto. Estas organizitaj kelkaj kursoj por komencantoj-geurbanoj, alia por progresintoj kaj tria en la progimnazio (ĉiuj kun ne malpli ol 8—10 vizitantoj), gvidataj de K. Rusev kaj N. Dimitrov.

Anton Genov

V. Moravica, en la distrikto de Vraca. En la komenco de la lernojaro 1964/1965 komenciĝis Esperanto-kurso en la lernejo „Vasil Kânĉev“. Ĝin partoprenas 22 ĝelernantoj kaj 5 instruistinoj. La kurson gvidas k-ino Trajana Petkova. En la sama lernejo estas organizita „Interenacia Klubo“. Ĝin partoprenas la lernantoj, kiuj studas kaj korespondas ruse, france kaj esperante.

Je la 30-a de marto ni organizos letervesperon. Ni petas, skribu al nia klubo! Respondo estas certa. Adreso: „Internacia klubo“, lernejo „Vasil Kânĉev“, v. Moravica, distrikto de Vraca.

Trajana Petkova

Pazargĝik. La 13-an de oktobro okazis la unua kunveno de la nova lernojaro. K-do Petko Arnaudov raportis pri la programo de la kursoj de Esperanto.

La 20-an de oktobro k-ino R. Georgieva prelegis pri siaj impresoj el Svedio.

Ni decidis malfermi kurson por komencantoj ĉiujauĝe vespere en la Domo de la Sindikatoj je la 12-a de novembro. Ankaŭ ni malfermos kursojn en kelkaj lernejoj kun kursgvidantoj la gekamaradoj: N. Koseva, K. Konstantinov, N. Angelov, P. Arnaudov, Iv. Pilicev k. a.

R. Georgieva

Marica. Je la 15-a de oktobro 1964 en urbo Marica estis fondita Esperanto-societo, kiun oni nomis „Trakia Lumo“. La kunvenon ĉeestis k-do Ĵeko Zaprianov el Dimitrovgrad, ĵurnalisto, membro de CK de BEA, kaj 26 fondintoj. Kiel estraranoj de la novefondita E-societo estis elektitaj jenaj kamaradoj: Todor Kurtev — prezidanto; Gergana Mirĉeva — vicprezidentino; Atanas Delĉev — sekretario; Stojka Kartelova — kasistino kaj Tanka Terzieva — respondeculino pri la junularo.

Atanas Delĉev

Kârĝali. La 23-an de decembro, okaze de la 105-jara datreveno de la naskiĝo de l' kreinto de Esperanto kaj la monato de la Esperanto-libro, la loka E-societo „Stelo“ aranĝis konvenan solenaĵon. En la granda kaj ornamita por la okazo salono de la Nacia Teatro kolektiĝis la malnovaj esperantistoj el la urbo, dekoj da gejunuloj kaj infanoj, lernantaj nun Esperanton kaj multnombraj simpatiantoj de la internacia lingvo venintaj manifesti sian respekton al Zamenhof kaj lia verko. La aŭditorio per si mem atestis kiom viva estas la kreaĵo de Zamenhof kaj kiajn solidajn poziciojn estas konkerinta la Esperanto-movado en Kârĝali. Estas ĝojige, ke nia junularo manifestas ĉiam pli grandan intereson al Esperanto — garantio ke la Verda Standardo daŭros plu flirtadi super la Orient-Rodopaj Montaroj kaj ĝi daŭros plu gajni novajn kaj novajn venkojn.

La prezidanto de la societo k-do S. Petrov prelegis pri la vtvo kaj la agado de L. Zamenhof kaj pri la signifo de la Esperanto-libro. La prelegon oni aŭskultis kun intereso.

Post la prelego estis prezentita riĉa programo el esperantaj kaj bulgaraj kantoj, deklamoj k. a. La programon partoprenis gestudentoj de la Instruista Instituto kaj infanoj de la urbaj lernejoj. Kortuŝa estis la plenumo de la infana ĥoreto, ĉar ĝia konsisto (turkaj kaj bulgaraj infanoj) simbole aludis pri la rolo kaj signifo de Esperanto.

La solena vespero finiĝis per projekcio de la filmo „48-a en verdstela Sofio“.

La sekvintan vesperon la vicprezidanto de CK de BEA k-do A. Lakov, kiu partoprenis la solenaĵon, prelegis en Esperanto pri la literaturaj kreaĵoj de Zamenhof kaj pri la pleniĉaj eblecoj de Esperanto por literatura verkado. La parolo de k-do Lakov

vekis intereson ne nur pro la profunda kaj kompetenta pritrakto de la temo, sed ankaŭ pro la fakto, ke iuj esperantistoj unuan fojon havis eblecon aŭskulti senriproĉan esperantan parolon. Pro tio oni esprimis deziron ke similaj renkontiĝoj efektiviĝu pli ofte.

Do, Esperanto en Kârĝali vivas kaj ĉiutage altiras novajn adeptojn.

St. Angelov

Vilaĝo Osenec, en la distrikto de Kolarovgrad. Nia societo „Verda Stelo“ malfermis du esperantajn kursojn por civitanoj. Unu el la kursoj funkcias en vilaĝo Drenovec. Ĝin frekventas 15 gekursanoj. La alia funkcias en v. Osenec en la kancelario de la Kooperativo. Ĝin vizitadas 10 gekursanoj. La kursoj okazas dufoje semajne.

Kursgvidanto estas Matjo Mateev.

Ni intencas malfermi kurson en la vilaĝo Osenec, sed ekster la Agrikultura Kooperativo kaj ankaŭ alian en la unuagrada (elementa) lernejo en vilaĝo Drenovec.

Matjo Mateev

Haskovo. La novan lernejon ni jam komencis. Ni malfermis 6 kursojn por komencantoj. Miĥail Elenov gvidas du kursojn por civitanoj; Nikola Pilev — unu por studentoj kaj alian por civitanoj; Zlatka Gegova — unu por infanoj kaj Borisl Kolev — unu por lernantoj. La nombro de la kursanoj estas 110. Krom tio la societo organizis kampanjon en la ruslingva gimnazio por nedeviga enkonduko de Esperanto. Ni kolektis 80 subskribojn de gelernantoj nur el 5 klasoj. Do, la komencaj rezultoj estas kuraĝigaj.

Nikola Pilev

Vidin. En monato novembro la Esperanto-societo „Espero“ en la urbo malfermis Esperanto-kurson por komencantoj. Ĝin partoprenas 15 gekursanoj.

Georgi Simeonov

Sofio. La Blindula Esperanto-Societo „Balkana Stelo“ post la morto de nia kara prezidanto Dimo Kolev elektis kiel prezidanton k-don Miĥail Karamiĥajlov. Vicprezidanto estas Sultana Mineva, sekretario — Nikola Dimitrov, kasistino Tanja Mileva, kulturkleriganto kaj delegito por alilandado — Slavi Slavov. Kontrola komisiono — Stojan Orozov, Jaĉla Farĥi kaj Dimitr Georgiev.

Dum la jaro funkciis kurso de Esperanto por blinduloj, gvidata de Miĥail Karamiĥajlov. Oni presigis en brajla skribo la lernolibron por komencantoj de Iv. Sarafov kaj Sim. Ĥesapĉiev. Parton de la eldonkvanto oni sendis al Plovdiv, Varna, Gabrovo, kie precipe junaj blinduloj lernas la lingvon.

Por la kuranta lernoĵaro 1964/1965 ni intencas enkonduki la lingvon en la lernejon por blindaj infanoj en Sofio. Tiuĉele oni faras la necesajn paŝojn.

La societo ricevis donace brajlan skribmaŝinon de la Germana Blindula Esperantista Grupo (EBLOGO) kaj Esperanto-librojn de la Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE).

La membroj daŭre korespondas kun siaj alilandaj amikoj.

Tanja Mileva kaj Jaĉla Farĥi

Smoljan. Je la 8-a de novembro 1964 la estraro de la E-societo „Kulturo“ restarigis denove la societan agadon. Oni decidis malfermi E-kursojn por komencantoj kaj progresintoj. Je la 16-a de novembro p. j. en la nomo de la kulturdomo „Ĥristo Botev“ estis malfermita E-kurso por komencantoj.

RENKONTOJ INTER ESPERANTISTOJ

Dum la somero Varna estis vizitata de esperantistoj el Pollando, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Sovet-Unio, Francio kaj aliaj landoj.

Okazis kelkaj intimaj renkontoj inter alilandaj esperantistoj kaj esperantistoj el Varna. La gastoj rakontis

La kurson gvidas k-do Petr Pamporov. La partoprenantoj montras grandan intereson al la Internacia Lingvo.

Ni esperas, ke dum 1965 j. en nian societon eniros amaso da novaj kaj bonaj esperantistoj, kiuj partoprenos niajn E-aranĝojn kaj nian organizan vivon.

Straŝimir Spasov

Vilaĝo Stoil Vojvoda, en la distrikto de Sliven. En la komenco de oktobro p. j. estis malfermita E-kurso, Dank' al la favora rilato de la lokaj instruistoj kaj plej multe de Ĥristo Slavov — prezidanto de la Vilaĝkonsilantaro oni faris bonan agitadon, subtenante nian iniciativon. Rezulte de la bona agado kaj pro la obstinaj zorgoj de s-ano A. Genov, la 15-an de januaro dum solena kunveno oni konfirmis 17 novatestitajn gesamideanojn.

Dafinka Ivanova

Vilaĝo Stralĝa, en la distrikto de Jambol. Ekfunkciis paralele du E-kursoj. Unu por la instruista kolektivo en Vilaĝmastruma Teknikumo, kaj alia por ĝelernantoj, ambaŭ gvidataj de Anton Genov el Nova Zagora. Funkcias ĝis nun ankaŭ kurso por ĝevilaĝanoj.

Spas Velkov

Vilaĝo Korten, en la distrikto de Sliven. Jam du monatojn en la progimnazio funkcias E-kurso por ĝepioniroj de V, VI kaj VII klasoj. Grupeto da 18 infanoj ĉiusemajne po du horoj lernas la lingvon Esperanto. La direktoro helpas multe por la Esperanto-progreso.

Gerga Slavova

siajn impresojn pri nia lando kaj popolo. Ili estas ravitaj de la konstruado de domoj kaj la kulturo de la bulgara popolo, ravitaj de la beleco de la bulgaraj montoj kaj de la bordregiono de Nigra Maro.

Tre interesa estis la konversacio kun

kamarado Borij, laboristo el Tuluzo, Francio, kiu partoprenis la intercivitane militon en Hispanio. Li prelegis pri nuna Francio kaj pri la religio.

Li vizitis la historian loĝlokon Bat-kaj aliajn rimarkindaĵojn kaj estas ravita de la komplezemo kaj kulturo de la bulgara popolo.

Kamarado Hari Dost, inĝeniero el urbo Karl—Marks—Stadt en G. D. R., dizertinto el la hitlerana armeo dum la lasta Mondmilito, bone posedanta la rusan lingvon skribe kaj parole, kiu vizitis la 36-an kongreson de la bulgaraj esperantistoj en Pleven, esprimis sian admiron pri la forta kaj tre vigla Esperanto-movado en nia lando. Li admiras pri la supreniro de la bulgara lando kaj popolo post 9. IX. 1944, pri la grandskala bonkonstruado en nia urbo, en nia lando. Li parolis entuziasme pri nia urbo Varna kaj pri sia lando, kie la Esperanto-movado ne estas tiel vigla kiel en Bulgario.

Aukau tre interesa estis la prelego de la egipta ĵurnalisto, esperantisto D-ro T. Megali je temo: Nuna Egiptujo. La prelego estis akompanata de tridek lumbildoj. En konversacio kun la esperantistoj D-ro Megali esprimis siajn impresojn pri Bulgario dirinte:

„Delonge mi volis viziti vian landon. Antaŭ ses jaroj mi estis en Varna. Mi ĉeestis la 33-an kongreson de la bulgaraj esperantistoj kaj pasigis kelkajn belajn tagojn. Varna tiel plaĉis al mi, ke nun mi kun mia familio estas tie ĉi, por pasigi la feriajn tagojn. Jam du agrablajn semajnojn mi ĝuas la vivon tie ĉi. La vetero estas bela. Ni ofte vizitas la belan strandon

kaj nin banis en la maro. Ni ankaŭ vizitis la belegan somerrestadejon „Ora Strando“. La ŝtona arbaro Dikili taŝfaris al mi fortan impreson. Ni vizitis la monaĥejon „Alaĝa“, ligita kun la antikva historio de la urbo. Kun grupo da esperantistoj mi vizitis la Internacian Domon de la ĵurnalistoj, kiu similas palacon. Tiom belan ripozdomon neniam mi estis vidinta. Mi estas ravita! La direktoro de la Domo parolis kun ni germane. Li estis tre afabla kaj donacis al ni po unu insigno „Internacia ĵurnalisto“. Varna estas bela kaj pura urbo. Varnanoj estas tre gastamaj. Aparte plaĉis al mi la manĝaĵoj. Multaj el ili estas konataj al ni en Egiptujo: precipe kuiritaĵo kun melongeno, kadaifo, hibisko, baklavao k. a. Ĉiuj ĉi tiuj nomoj ankaŭ estas egiptaj (venintaj en la bulgaran per la turka lingvo). Mi trovis en la bulgara lingvo multajn arabajn vortojn. Ankaŭ iuj tradicioj estas samaj.

Mi restas kun plej belaj impresoj pri via urbo — perlo de la Nigra Maro. Varna estas belega urbo — urbo ĝardeno. Ĉie estas floroj, multaj floroj. Multaj stratoj havas florajn bedojn. Tio lasas neforgeseblan impreson.

Ĉe vi oni multe konstruas. Nun Varna estas pli bela. Grandaj kaj modernaj konstruaĵoj vidiĝas ĉie en la urbo.

Mi admiras pro la agado kaj la gastamo de la bulgara popolo kaj esperas, ke baldaŭ mi revenos en la belan urbon Varna, ĉar tie ĉi mi jam havas tre karajn amikojn, esperantistojn“.

P. Colov

УСПЕХ НА ЕСПЕРАНТИСТИТЕ В ПЛОВДИВ

Пловдивските есперантисти положиха много усилия и получиха плодотворни резултати. Техен успех е окръжно № И-7-913 от 9. X. 1964 год., което отдел „НАРОДНА ПРОСВЕТА“ при Окръжния народен съвет издаде и което ние помещаваме изцяло, за да се има предвид в бъдещата дейност на есперантските дружества в окръжните градове, които имат за първа

грижа като окръжни комитети да се грижат за развитието на есперантското движение в окръга.

ОКРЪЖЕН НАРОДЕН СЪВЕТ

НАРОДНА ПРОСВЕТА

№ И-7-913

9. X. 1964 год.

ПЛОВДИВ

ДО ДИРЕКТОРА

на _____ училище

гр, (с.) _____

Пловдивски окръг

В много училища и висши учебни заведения в чужбина и у нас години наред се изучава международния език ЕСПЕРАНТО като редовен или факултативен учебен предмет.

В Софийския държавен университет и във висшите учебни заведения във Варна и Свищов има катедри по езика ЕСПЕРАНТО. От миналата учебна година в седем средни училища и в три висши учебни заведения в Пловдив този език се изучава факултативно.

Министерството на народната просвета удовлетворява исканията на училищата, където са налице необходимите условия за преподаване на ЕСПЕРАНТО.

Отдел Народна просвета, Окръжният комитет на Съюза на учителите и Есперантското дружество „Културо“ — Пловдив, като имат предвид нарастващия интерес и желание от страна на учащите се:

а) да изучават международния език и да повишават по този начин езиковата си и обща култура;

б) поради това, че този език намира все по-широко приложение в международното общуване и сътрудничество,

РЕШИХА

да открият от 2 ноември т. г. тримесечен курс за подготовка на учители по ЕСПЕРАНТО в средните училища от Пловдивски окръг, тъй като се чувства належаща нужда от такива преподаватели.

Курсът ще се провежда само в НЕУЧЕБНИЯ ДЕН ОТ СЕДМИЦАТА от 9 до 12 часа в салона на есперантското дружество „Културо“ — Пловдив, ул. „Леонардо да Винчи“ № 6.

След завършване на курса участниците ще положат изпит за добиване на документ, даващ им право да преподават този език.

КУРСИСТИТЕ ЗАПЛАЩАТ САМО ИЗПИТНАТА ТАКСА — 4 лева.

Настоящото писмо да се разгледа в учителските съвети и се излъчат учители, които ще следват курса, като имената им се съобщят писмено най-късно до 25 октомври т. г. на адрес:

ПОЩЕНСКА КУТИЯ № 151 — Пловдив, за УЧИТЕЛСКИЯ КУРС.

НАЧАЛНИК ОТДЕЛ НАРОДНА ПРОСВЕТА

(Ив. Аксийски)

ПРЕДСЕДАТЕЛ ОК НА СЪЮЗА НА УЧИТЕЛИТЕ

(В. Коцев)

ПРЕДСЕДАТЕЛ НА ЕСПЕРАНТСКОТО Д-ВО

(Ив. Батаклиев)

TRA LA GAZETARO

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (de 20. VI. 1964) — anonco pri konkurso por honorariata instruanto de Esperanto ĉe la Filologia Fakultato de la Sofia Universitato. La dokumentojn por partopreno oni devas prezenti ĝis la 26-a de aŭgusto 1964.

En ĵ. „**Dârjaven Vestnik**“ — Sofio (de 26. VI. 1964) — la sama anonco.

En ĵ. „**Trevnenski Zov**“ — Trjavna (de 30. VII. 1964) — artikoleto de Ivan Gânzov „Honore al la 36-a Kongreso de Esperanto“, informante ke la Plenkomitato de la Urba Konsilantaro nomis la fervojan trairejon proksime ĉe la stacidomo „Esperanto“.

En ĵ. „**Septemvrijsko Slovo**“ — Miĥajlovgrad (de 3. VIII. 1964) — artikolo de Asen Penkov — „Unuaj en la lando“ — kun bildo prezentanta la transdonon de la transira standardo de Bulgara Esperantista Asocio al la societo „Septembra Gloro“ en Miĥajlovgrad dum la 36-a E-Kongreso en Pleven.

En ĵ. „**Iskra**“ — Kazanlâk (de 15. VIII. 1964) — artikolo de Ivan Zahariev „Esperanto dum la jardudeko“ — en kiu la aŭtoro rakontas pri la agado de la societo „Roza Valo“ dum la lastaj dudek jaroj.

En ĵ. „**Evrejski Vesti**“ — Sofio (de 17. VIII. 1964) — artikolo de M. Benvenisti titolita „La murdinto de Anne Frank ne estas juĝota“.

En ĵ. „**Rodopski Ustrem**“ — Smoljan (de 25. VIII. 1964) — artikolo de I. Draginov — „Kongreso de la bulgaraj esperantistoj“ — rakonto pri la 36-a kongreso en Pleven.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ — Sofio (de 27. IX. 1964) — detala kaj interesa artikolo de N. Aleksiev „La Universala Kongreso de Esperanto en Hago“. La aŭtoro, prezidanto de Bulgara Esperantista Asocio, rakontas pri la varia laboro de la 49-a Kongreso en Hago kaj ĝiaj decidoj.

En ĵ. „**Narodno Delo**“ — Varna (de 1. X. 1964) — informo de Z. Dimitrova — „Egipta ĵurnalisto pri Bulgario“ — en kiu la aŭtorino rakontas pri la parolado de D-ro T. Megali kun lumbildoj en Varna, pri liaj impresoj pri Bulgario kaj Varna.

En la sama ĵurnalo (de 4. X. kaj 4. XI. 1964) — informo, ke la Esperantista Societo en Varna organizas kursojn por komencantoj kaj progresintoj.

En ĵ. „**Narodna Tribuna**“ — Lom (de 5. X. 1964) — en la „Kolumno de la Esperantisto“ — artikolo de L. Angelov, lernanto, „Kun la Internacia Lingvo tra Eŭropo“. La aŭtoro rakontas pri sia partopreno en la 20-a Junulara Esperanto-Kongreso kaj proponas ke ankaŭ en urbo Lom la lernantoj komencu la lernadon de Esperanto.

En ĵ. „**Ludogorska Pravda**“ — Razgrad (de 8. X. 1964) — artikolo, en kiu la aŭtoro Drumi Mateev, prezidanto de la Esperantista Societo en Razgrad, rakontas pri la varia agado de la esperantistaj societoj konekse kun la 36-a kongreso en Pleven kaj pri la antaŭkongresa kunveno en la restadejo Voden kun reprezentantoj de la societoj k. a. La artikolo estas titolita „Pliiĝas la vicoj de la esperantistoj en la distrikto“.

En ĵ. „**Iskra**“ — Kazanlâk (de 10. X. 1964) — informo „Memorinda celebrado“. Oni rakontas pri la 30-jara datreveno de la mortigo de la esperantisto-heroo Ivan Grudev, pri la solenaĵo okaze de la inaŭguro de memortabulo de D-ro Zamenhof apud vilaĝo Enina en Balkan-montaro.

En ĵ. „**Septemvri**“ — Stara Zagora (de 10. X. 1964) — informo de Iv. Zahariev „Solenaĵo de vilaĝo Enina“. La aŭtoro rakontas pri la samaj okazintaĵoj.

En ĵ. „**Rabotniĉesko Delo**“ — Sofio (de 26. X. 1964) — informo „Grekaj ekskursantoj en Sofio“, inter kiuj ankaŭ estis esperantistoj el urbo Tesaloniko, kiuj estis bonvenigitaj kore de multaj sofiaj esperantistoj.

En ĵ. „**Rodopski Ustrem**“ — Smoljan (de 17. X. 1964) — artikolo „Esperanto-movado en Bulgario“, de P. Pamporov.

En ĵ. „**Oteĉestven Glas**“ — Plovdiv (de 17. X. 1964) — informo, ke la esperantista societo „Kulturo“ malfermas kurson. La unuan lecionon laŭ Ĉe-metodo faris G. Dimov el Varna.

En ĵ. „**Zemedelsko Zname**“ — Sofio (de 27. X. 1964) — informo de Ĥr. Kanev — „Esperanto — utila rimedo por interkompreniĝo kaj amikeco“ — pri la gastado de la grekaj esperantistoj en Sofio.

En ĵ. „**Oteĉestven Front**“ — Sofio (de 29. X. 1964) — informo de Ĥr. Kanev — „Kora renkontiĝo inter bulgaraj kaj grekaj esperantistoj“.

ŜTATA INDUSTRIA ENTREPRENEJO
„FIZIKAJ KAJ LABORATORIAJ APARATOJ“
EN URBO PLEVEN

TELEFONOJ: Direktoro 27-55

Telefona centralo 30-25

Ŝtata Industria Entreprenejo

„FIZIKAJ KAJ LABORATORIAJ APARATOJ“ — PLEVEN
produktas jenajn plej diversajn specojn de aparatoj por
ekipado de kabinetoj de fiziko kaj kemio en la lernejoj kaj
laboratorioj por eksporto kaj por la enlanda merkato:

Funkcianta elektrostatika maŝino

Malmuntebla transformatoro kun ĉiu necesa ilaro kaj
transformatoro kun silena rektifikilo

Profilo de benzina kaj dizela kvartakta motoro

Papina kaldrono kun manometro

Aparato por demonstrado de la kondiĉitaj refleksoj

Aparato de Maĥ (por la ondoforma movado)

Diferenciala kaj normala ilaro

Pluvmezurilo

Kardiografo

Kolekto de Gross

Universala galvanometro

Funkcianta modelo de elektromotoro kun generatoro

Aparataro por distilado de la nafto

Kimografo

Wilsona kamero por observado de alfa kaj beta
korpuskloj

Cirkeloj

kaj multaj aliaj

La produktataj en la entreprenejo aparatoj estas alkvalitaj.
Eksportanto — Ŝtata Komerca Entreprenejo „Raznoiznos“,
str. Car Asen 1, Sofio

